# *Agnoskas raporto de la Monda Banko la kvaliton de la kuba eduksistemo.*



La Monda Banko ?uspublikigis raporton kiu pritraktas la problemaron de la edukado en Latinameriko kaj Karibio kaj esprimas ke “escepte de Kubo neniu latinamerika sistemo posedas mondajn indikilojn”.

Sub la titolo Eminentaj profesoroj. Kiel plibonigi la lernadon en Latinameriko kaj Karibio, la studo analizas la edukajn publikajn sistemojn de la lando en la kontinento kaj la ?efajn defiojn alfrontendajn.

La monda banko memorigas ke ?iuj registaroj atente sekvas “la kvaliton kaj laboron de la geinstruistoj” je la horo kiam la celoj de la edukaj sistemoj adapti?as al la novaj realoj. Tamen, la kerno de la afero estas en la akirado de kompetentoj kaj ne nur en la simpla akumulado de konoj.

La konkludoj de la raportoj estas akraj. La monda banko emfazas ke “la averaga malalta kvalito de la geinstruistoj de Latinameriko kaj Karibio” estas la ?efa obstaklo al progreso de la edukado en la kontinento. La akademiaj enhavoj estas malta?gaj kaj la praktikoj senefikaj.

Malmulte kaj misformitaj, la geinstruistoj apena? donas 65% de sia tempo en la klaso al la instruado, “kio egalas al unu perdita tago de instruado semajne”.

Aliflanke, la didaktika materialo disponebla estas malmulte uzada, speciale la novaj teknologioj de informado kaj komunikado. Krome, la geinstruistoj ne sukcesas altrudi sian a?toritatecon, allogi la atenton de la gelernantoj kaj estigi partoprenon.

La? ala raporto “ neniu docenta korpuso de la regiono pobas konsideri?i altkvalita kompare kun la mondaj indikiloj, kun la notinda escepto de Kubo.”

Fakte, nur Kubo, kie la edukado estas la ?efa prioritato ekde 1959, disponas de eduka sistemo efika kaj profesoroj de alta nivelo. La kariba lando havas nenion enviindan al la plej evoluintaj landoj. La kariba insulo estas, aldone, la lando kiu je tutmonda skalo dedi?as la plej altan ciferon de la nacia bu?eto al la eduka sistemo, tio estas, 13%.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/32640-agnoskas-raporto-de-la-monda-banko-la-kvaliton-de-la-kuba-eduksistemo

Radio Habana Cuba